



THE ESPERANTO MONTHLY

A
MAGAZINE
FOR
TEACHERS
AND
STUDENTS
OF THE
INTERNATIONAL
LANGUAGE



*All the world
at your elbow*

THE MODERN BUSINESS MAN
cannot afford to carry on his inter-
national business in the old way. In the
foreign correspondence department there
used to be highly qualified linguists for
each foreign language.

*Now every clerk in the office, from the office-boy
upwards, can correspond with any country by
means of ESPERANTO. Hundreds of busi-
ness men and women throughout the world are
learning the lessons in Commercial Esperanto
now running in this Magazine.*

Published by
THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (INC)
17. HART STREET, LONDON, W.C.1.

ESPERANTO AT A GLANCE

ESPERANTO IS PHONETIC.

All letters sounded :
one letter one sound.

ACCENT or STRESS falls on the second last syllable.

NO IRREGULARITIES.
NO EXCEPTIONS.

THE ALPHABET OF ESPERANTO

A a	B b	C c	Ĉ ĉ	D d	E e	F f	G g
<i>ah</i>	<i>bo</i>	<i>iso</i>	<i>ĉho</i>	<i>do</i>	<i>eh</i>	<i>fo</i>	<i>go</i>
Ĝ ĝ	H h	Ĥ ĥ	I i	J j	Ĵ ĵ		
<i>Jec</i>	<i>ho</i>	<i>hho</i>	<i>ee</i>	<i>yo</i>	<i>zho</i>		
K k	L l	M m	N n	O o	P p	R r	S s
<i>ko</i>	<i>lo</i>	<i>mo</i>	<i>no</i>	<i>oh</i>	<i>po</i>	<i>ro</i>	<i>so</i>
Ŝ ŝ	T t	U u	Ŭ ŭ	V v	Z z		
<i>sho</i>	<i>toe</i>	<i>oo</i>	<i>wœ</i>	<i>vo</i>	<i>zo</i>		

No Q, W, X, or Y.

A, E, I, O, U have approximately the sounds as in *bar, bear, bier, bore, boor.*

C is not sounded like S or K, but like *ts* in *Tsar.*

J has the sound of *y* in *yes.*

The sounds of ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, and ŭ are heard in *leech, liege, lock, leisure, leash, and leeway.*

THE GRAMMAR is based upon SIXTEEN FUNDAMENTAL RULES.
THE PARTS OF SPEECH are formed from Root-Words by the addition of appropriate Letters.

O is the ending of the NOUN:
fakto gluo
telefono fajro
piano tasko

ADJECTIVES end in **A**
evidenta freŝa
longa furioza
granda simpla

NOUNS and ADJECTIVES form the PLURAL by adding
evidentaj faktoj longaj telefonoj grandaj pianoj

J *aj, oj* sound as in *my boy*

THE SIMPLE VERB HAS ONLY SIX INFLECTIONS.

INFINITIVE. PRESENT. PAST. FUTURE. CONDITIONAL. IMPERATIVE.

I	AS	IS	OS	US	U
ESTI	estas	estis	estos	estus	esta
LERNI	lernas	lernis	lernos	lernus	lernu
INSTRUI	instruas	instruis	instruos	instruus	instruu

N marks the ACCUSATIVE (*direct object*)
Mi (*I*) instruas lin (*him*)
Li (*he*) instruas min (*me*)
Ŝi lernas Esperanton

ADVERBS end in **E**
rapide
entuziasme
diligente

ESTU PRETA: LERNU ESPERANTON

PARTICIPLES used as ADJECTIVES, NOUNS, and ADVERBS:

ACTIVE—Present -ANT'	Past -INT'	Future -ONT'
PASSIVE—Present -AT'	Past -IT'	Future -OT'
Mi estas instruanta.	Mi estas la instruanto.	Instruante, mi lernas.
Vi estas instruata.	Vi estas la instruato.	Instruate, vi lernas.

ĈU pr. <i>chew.</i> ASKS QUESTIONS.	piano } harpo } fluto } violono } orgeno } trumpeto }	estas } INSTRU- MENTO }	rozo } tulipo } lilio } geranio } violo } narciso }	estas } FLORO }	banano } tomato } melono } olivo } oranĝo } figo }	estas } FRUKTO }	elefanto } gorilo } ĝirafo } kato } hundo } kamelo }	estas } BESTO }

Let your YES be **JES** and your NAY be **NE**

LA tasko }
piano }
(The) fiŝo }
aneddoto }
progreso }
raporto }

estas simpla }
(is) granda }
estis freŝa }
(was) longa }
estos rapida }
(will be) favora }

THE PREFIX
MAL

DENOTES
OPPOSITES.

malsimpla }
malgranda }
malfreŝa }
mallonga }
malrapida }
malfavora }

KOLOROJ.

blanka papero }
ruĝa inko }
blua kraĵono }
bruna ĉokolado }
rozaj lipoj }

NUMERALS—UNU, 1; du, 2; tri, 3; kvar, 4; kvin, 5; ses, sep, ok, naŭ, dek; cent, 100; mil, 1000; miliono. ORDINALS: unua klaso, dua klaso, tria klaso.

PROFESSIONS shown by suffix

IST dentisto ĵurnalisto
farmaciisto botisto

FEMININES shown by suffix

IN patro patrino
reĝo reĝino
leono leonino

An ESPERANTO KEY, containing Grammar, Vocabulary, and Exercises, will be sent on receipt of a penny stamp by THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Incorp.), 17 Hart Street, London, W.C.1

*Under the auspices of the Common Commercial
Language Committee.*

The New International Experiment.

COMMERCIAL ESPERANTO BY SELF-TUITION IN THREE MONTHS.

FIFTH WEEK.

Read over the lesson in the first column ALOUD. Find out the meaning by referring to the second column. Read it again and again as directed till it is mastered. Then, covering the first column, translate at sight and ALOUD from the English in the second column. Try to get a friend to read the Esperanto to you.

READ THIS

ORAL EXERCISE.

ALOUD. IX. Koloroj.

Blanka, griza, nigra, verda, ruĝa, roza, purpura, flava, blua, bruna, oranĝa, skarлата, viola; dubeblua, dubebruna, dubeverda.

Kia estas la koloro de ĉi tiu ŝtofo?

La koloro de ĉi tiu ŝtofo estas blanka.

Ĉu vi havas en provizo grizan flanelon? . . . nigran silkon? . . . ruĝan katunon? . . . purpuran veluron? . . . skarlatajn rubandojn? . . . brunajn gantojn?

Jes, fraŭlino, kiom vi deziras? Mi deziras tri jardojn da . . .; du metrojn da . . .; kvardek colojn da . . .; ses ulnojn da . . .; kvin futojn da . . . (*use the names of goods in the previous paragraph*); du parojn da gantoj.

Bonvulu doni al mi dek funtojn da verdaj pizoj; . . . da flavaj lentoj, . . . da nigraj prunoj, . . . da brunaj piroj.

Ĉu ni sendu ilin al vi? Dankon, sinjoro, sendu ilin, mi petas, al No. 3 X Strato.

Bonan tagon! Bonan matenon! Bonan vesperon! (Mi deziras al vi *understood.*)

Se plaĉas al vi. Ĝis revido!

IX. Colours.

White, grey, black, green, red, pink, purple, yellow, blue, brown, orange, scarlet, violet; bluish, brownish, greenish.

What is the colour of this stuff (material)?

The colour of this stuff is white.

Have you in stock grey flannel? . . . black silk? . . . red cotton (cloth)? . . . purple velvet? . . . scarlet ribbons? . . . brown gloves?

Yes, miss, how much (*or* many) do you desire? I desire three yards of . . .; two metres of . . .; forty inches of . . .; six ells of . . .; five feet of . . .; two pairs of gloves.

Please give (*to*) me ten pounds of green peas; . . . of yellow lentils, . . . of black plums, . . . of brown pears.

May we send them to you? Thanks, sir, send them, please (*I beg*), to No. 3 X Street.

Good day! Good morning! Good evening!

If you please. *Au revoir!*

WRITTEN EXERCISE.

Write in a note-book a translation of the English into Esperanto, leaving a blank for the words you do not know. Then refer to the Esperanto, write in the words to be learned, and make all necessary corrections. Next day, read your Esperanto aloud, translate it into English, and compare with the text.

II. Translation Exercise.

1. We have¹ received your telegram (postcard, note, invoice, account, cheque, bill of exchange). 2. I have the honour to inform you that I have opened a warehouse in this city for the sale of clothing for ladies and gentlemen. 3. I duly received your letter in which you enclosed cheque for £5. 4. We regret to inform you that we are not able to pay your account this week, but to hope to pay it next week. 5. Please send me a full account of our debt to you. 6. Immediately after receipt of your telegram, we despatched the goods to your address.

II. Traduko.

1. Ni ricevis¹ vian telegramon (poŝtkarton, noton, fakturon, kalkulon, ĉekon, kambion). 2. Mi havas la honoron informi vin, ke mi malfermis magazenon en ĉi tiu urbo por la vendado de vestaro por sinjoroj kaj sinjorinoj (gesinjoroj²). 3. Mi bone ricevis vian leteron en kiu vi enmetis ĉekon por kvin funtoj. 4. Ni bedaŭras informi vin, ke ni ne povas pagi vian kalkulon ĉi tiun semajnon,³ sed ni esperas pagi ĝin proksiman semajnon. 5. Bonvolu sendi al ni plenan kalkulon de nia ŝuldo al vi. 6. Tuj post ricevo de via telegramo, ni ekspedis la komercaĵon al via adreso.

¹ The auxiliary *have* in English is not translated by *Hav'*. *Est'* is the only auxiliary in Esperanto. ² The prefix *ge* denotes persons of both sexes. ³ Accusative of *time*.

SIXTH WEEK.

READ THIS
ALLOUD.

X. Prezoj.

Kiom kostas ĉi tiu vazo? Ĝi kostas kvin spesmilojn (dek ŝilingojn).

Kiom kostas ĉi tiu drapo? Ĝi kostas po tri ŝilingoj kaj ses pencoj por jardo.

Kiom kostas ĉi tiu teo? Ĝi kostas po kvar ŝilingoj por funto.

La prezo estas tro kara.

Ĉu vi havas malkaran kvaliton? Jes, sinjorino, sed mi ne rekomendas ĝin.

Bonvolu doni al mi kvin funtojn da kafo.

Ĉu vi donas rabaton por kontanto?

Jes, sinjoro, ni donas rabaton de dek pro cento.

Sendu la pakaĵon per ŝarĝvagono, . . . poŝto, . . . speciala liveristo, . . . vaporsipo.

La kvanto estas tro granda, ĉu mi povas aĉeti duonon? Ne, sinjorino, sed ni povas vendi tri-kvaronojn.

ORAL EXERCISE.

X. Prices.

How much does this vase cost? It costs five spesmiloj (10s.): (A *spesmilo* sm. = 2s.).

How much does this (woollen) cloth cost? It costs (at the rate of) three shillings per yard.

How much does this tea cost? It costs four shillings per pound.

The price is too dear.

Have you (a) cheap quality? Yes, madam, but I do not recommend it.

Please give me five pounds of coffee.

Do you give (a) discount for cash payment?

Yes, sir, we give (a) discount of 10%.

Send the package by goods train, . . . post, . . . special messenger, . . . steamship.

The quantity is too great, can I buy a half? No, madam, but we can sell three-quarters.

WRITTEN EXERCISE (*see instructions, p. 9*).

III. Translation Exercise.

1. We manufacture cotton. 2. This material is manufactured by us in our manufactory. 3. They are soap makers. 4. These fabrics come from France. 5. The wool is to be made into cloth. 6. Our trade-mark is a green star. 7. The company is occupied with the manufacture of oil. 8. The weaver weaves the cloth on a loom. 9. The cloth is woven by him. 10. This cloth has a fine texture. 11. I learned the art of weaving in Bolton. 12. How many looms have you in your mill?

III. Traduko.

1. Ni fabrikas katonon. 2. Ĉi tiu ŝtofo estas fabrikita de ni en nia fabrikejo. 3. Ili estas fabrikistoj de sapo (*or* sapfabrikistoj). 4. Ĉi tiuj fabrikoj venas el Francujo. 5. La lano estas farota en drapon. 6. Nia fabrikmarko estas verda stelo. 7. La kompanio okupiĝas (*or* estas okupata) pri la fabrikado de oleo. 8. La teksisto teksas la drapon per teksilo. 9. La drapo estas teksata (*or* teksiĝas) de li. 10. Ĉi tiu ŝtofo havas delikatan teksaĵon. 11. Mi lernis la teksarton en Bolton. 12. Kiom da teksiloj vi havas en via fabrikejo (*or* teksejo).

SEVENTH WEEK.

ORAL EXERCISE.

READ THIS

ALoud. XI. Komparo, k.t.p.

Kara, pli kara, plej kara; kare, pli kare, plej kare.

Ni vendas pogrande, . . . pomalgrande, . . . malkare.

Ju pli malkara la prezo, des pli rapida la vendo.

Mi aĉetas en la plej malkara vendejo kaj vendas en la plej kara.

Ĉu vi vendas la gantojn rapide? Oni vendas la nigrajn gantojn tre rapide, sed oni vendas la brunajn gantojn pli rapide.

Kial oni vendas pli multe da karbo en vintro, ol en somero?—Ĉar en somero estas pli varme, ol en vintro.

Tiu drapo estas malpli bona, ol ĉi tiu.

Kie mi povas aĉeti la plej bonan tolon pogrande?

Oni diras, ke oni povas aĉeti plej malkare en Belfast.

Tiu punto estas tiel bela, kiel tiu, kiun oni faras en Bruĝo.

Mi dankas vin pro la komplimento.

Bonan tagon, kiel vi fartas? Tre bone, mi dankas.

XI. Comparison, etc.

Dear, dearer, dearest; dearly, more dearly, most dearly.

We sell wholesale, . . . retail, . . . cheaply.

The cheaper the price, the more rapid the sale.

I buy in the cheapest market and sell in the dearest.

Do you sell the gloves quickly? One sells the black gloves very quickly, but one sells the brown gloves more quickly.

Why does one sell more coal in winter than in summer? Because in summer (it) is warmer than in winter.

That (*woollen*) cloth is less good than this.

Where can I buy the best linen wholesale?

They say that one can buy most cheaply in Belfast.

That lace is as beautiful as that which they make in Bruges.

I thank you for the compliment.

Good day, how do you do? Very well, thank (*you*).

WRITTEN EXERCISE (see instructions, p. 9).

IV. Translation Exercise.

Exercise in the use of the reflexive pronoun *si*. *Si* is never part of the subject of a sentence.

1. They sent me *their* whole stock of oranges. 2. Mr Blanc of Lyons with *his* London representative has arrived at the Central Hotel. 3. The consul and his secretary live at the Consulate. 4. Mr Grant has taken upon *himself* full responsibility for *his* Spanish clients. 5. The agent told me that his clients have the largest warehouse in Barcelona. 6. The shipmaster went from Mr Ford's office to his ship. (*Translate this two ways—(a) to his own ship; (b) to Mr Ford's ship.*) 7. The ship with its cargo was lost on its first voyage.

IV. Traduko.

1. Ili sendis al mi sian tutan provizon de oranĝoj. 2. S-ro Blanc el Lyons kun sia Londona reprezentanto alvenis ĉe la Centra Hotelo. 3. La konsulo kaj lia sekretario loĝas ĉe la Konsulejo. (*N.B.—There is no reflexive in this sentence.*) 4. S-ro Grant prenis sur sin plenan respondecon por siaj hispanaj klientoj. 5. La agento diris al mi, ke liaj klientoj posedas la plej grandan magazenon en Barcelona. 6. La ŝipestro iris de la oficejo de S-ro Ford (*a*) al sia ŝipo; (*b*) al lia ŝipo. 7. La ŝipo kun sia ŝarĝo perdiĝis dum sia unua vojaĝo.

EIGHTH WEEK.

READ THIS

ALLOUD. XII. Diversaj Aferoj.

Estimata Sinjoro, Sinjoroj, Karaj Sinjoroj.

Mi ricevis vian leteron. Se mi ricevus lian ĉekon, mi donus al li kvitancon. Se mi povos vendi dudek jardojn da ĉi tiu drapo ĉiutage, mi baldaŭ havos grandan profiton.

Ĉu mi vendu la akciojn de la kompanio ĉe la borso? Ne, sed vi povas vendi la obligaciojn.

Ni faru kontrakton. Kiam estos la pagtago? La pagtago estos vendredo.

Kiam vi saldos vian konton? Mi saldos ĝin en la proksima semajno.

Li donis al mi prunton. Prunte donu (*or* Alpruntu) al mi dek funtojn, mi petas. Mi dankas vin pro la prunto. Li prunteprenis (*or* depruntis) de mi naŭ ŝilingojn. Mi donos al vi la prunton, kondiĉe, ke vi repagu ĝin en unu monato.

Permesu, ke mi prezentu al vi S-ron G. P.

Mi estas tre kontenta renkonti vin.

Mi estas ĉiam preta servi vin.

Sincere via, Vere via.

ORAL EXERCISE.

XII. Various Matters.

Esteemed Sir, Gentlemen, Dear Sirs.

I (*have*) received your letter. If I were-to-receive his cheque, I would give (*to*) him a receipt. If I (*will*) can sell twenty yards of this (*woollen*) cloth daily, I soon will have (*a*) large profit.

May I sell the shares of the company on the exchange? No, but you may sell the debentures.

Let us make (*a*) bargain. When is the settlement-day? The settlement-day is Friday.

When will you settle your account? I will settle it (in the) next week. (*Saldi* is to settle a balance.)

He gave (*to*) me a loan. Lend me £10, please. I thank you for the loan. He borrowed from me nine shillings. I will give to you the loan, on condition that you repay it within one month.

Permit me to introduce you to Mr G. P.

I am very pleased to meet you.

I am always ready to serve you.

Sincerely yours, Truly yours.

WRITTEN EXERCISE (*see instructions, p. 9*).

V. Translation Exercise.

1. The success of his undertaking made him happy. (Note the use of IGI, *to make*, as a separate word, and as a suffix.) 2. The cellarman filled the bottles with champagne. 3. He made known to me that he had fulfilled my orders (commands). 4. I will draw his attention to your order (for goods). 5. Do you intend to continue the sale of our goods in your district? 6. Our agent has just informed us that he shipped the goods to you yesterday. 7. We thank you for your enquiry of yesterday, and respectfully draw your attention to the announcement on page 32 of our catalogue. 8. We assure you that we shall do our best to please you. 9. After thinking over the matter, we have decided to appoint you our agent in Copenhagen. 10. We have given your letter full consideration, and regret that we cannot agree to your proposal to establish a branch of our firm in Brussels.

Revise all previous exercises.

If you have not registered your name, profession, and address with the Common Commercial Language Committee, DO IT NOW. Send 2½d. in stamps, or international reply coupon, to cover postages, and address your letter S-ro S. R. Marshall, c/o Thos. Cook & Son, Ludgate Circus, London, E.C.4.

* * *

Komercaj Anoncoj.

BUENOS AIRES.—Comité para la propagacion del Esperanto en el Comercio, Florida 150, Buenos Aires, has been established with aims similar to those of the C.C.L.C.

ROTTERDAM.—Komercistoj ĉiulandaj, kiuj deziras komerci en Nederlando, skribu detale al: P. J. Vermaas, N. Binnenweg 340a, Rotterdam.

KOMERCILATOJ.—Oni deziras transdoni la reprezentadon de brodaĵoj de St. Gallen (broditaj sur tolo, katuno, kaj silko), delikate laboritaj tolaĵoj kaj subtilaj, elegantaj salongarnaĵoj. Pagokapablaj reprezentantoj kaj aĉetantoj sin turnu al S-ro Julius Hefti, Hinwil, Zürich, Svisujo.

1. La sukceso de lia entrepreno igis lin feliĉa (*or feliĉigis lin*). 2. La kelisto plenigis la botelojn per ĉampano. 3. Li sciigis al mi, ke li plenumis miajn ordonojn. 4. Mi atentigos lin pri via mendo. 5. Ĉu vi intencas daŭrigi la vendon de nia komercaĵo en via distrikto? 6. Nia agente ĵus sciigis al ni, ke li enŝipigis la komercaĵon al vi hieraŭ. 7. Ni dankas vin pro via hieraŭa informpeto, kaj respektplene atentigas vin pri la avizo sur la 32-a paĝo de nia katalogo. 8. Ni certigas al vi, ke ni faros nian eblon por kontentigi vin. 9. Pripensinte la aferon, ni decidis estigi vin nia agente en Kopenhago. 10. Ni donis al via letero plenan konsideradon, kaj bedaŭras, ke ni ne povas konsenti al via propono starigi filion de nia firmo en Bruselo.

“PRO BELGICA.” Fondiĝis en Belgujo, sub la nomo “PRO BELGICA,” patriota entrepreno por la restarigo de la komerco kaj industrio, “PRO BELGICA” celas interrilatigi la belgajn industriistojn kaj komercistojn kun iliaj alilandaj kolegoj, kaj enkonduki Belgujon ĉiuspecajn eksterlandajn produktojn.

Niaj industriistoj kaj komercistoj, kiuj deziras interrilati kun belgaj firmoj, starigi komeredeponejojn aŭ havi reprezentantojn en Belgujo povas sin turni al “PRO BELGICA,” 60, Boulevard St., Liévin, 60, en Gand (Gent, Ghent), kiu donos al ili la necesajn informojn kaj helpon.

The Machinery of International Friendship.

The words of President Wilson, quoted in English and Esperanto on the opposite page, addressed by him to the trading community of Manchester on the occasion of his receiving the freedom of that city, breathe sentiments familiar to all Esperantists, as those most frequently expressed in favour of the adoption of Esperanto as an instrument for the establishment of friendly relations between the peoples of the world. We feel proud that what we have continually spoken in the streets and lanes has now been proclaimed upon the house-tops.

"Friendship must have a machinery," said the eloquent President, with the League of Nations before his mind. That is the great work to the accomplishment of which he has dedicated his energies in his unique European visit. In that work he will find every Esperantist a co-operator. But we wish to express our humble view that without an international language the League of Nations will be a cumbersome piece of machinery incapable of producing the best results.

What oil is to a machine, so would Esperanto be to the League of Nations. It would make it do its work sweetly and smoothly, it would avoid friction, it would enable the League to develop a degree of power otherwise unattainable.

In an interview with a *Times* correspondent shortly after his arrival in France, President Wilson pointed out that the difference between the Peace Conference now sitting and that which met at Vienna, is that we have now a meeting of the servants of the people, while the latter was a Congress of "bosses."

To make the League of Nations a

success it must have the sympathy and co-operation of the common people. Every individual must and can be made to feel that he is able to do something to further its aims. If that cannot be done, there is a danger that the League may in course of time lose touch with popular sentiment and degenerate into a League of "bosses."

The League must devote itself to developing in the common people of the world what has been called "the International Mind." The International Mind can only be imperfectly created by the study of the literature, history, and politics of foreign countries. What is necessary to complete success is something which would introduce "the human touch." That can only be brought about by an international language used in trading, in correspondence, and in conversation. We cannot force our mother tongue on other peoples. We would resent theirs being forced on us.

It is, therefore, a common-sense proposition that there should be a language common to all.

If the League of Nations were to require the schools of the world to teach Esperanto, the coming generation would in six months break down the language walls which divide humanity, and begin the process of a real union of mankind. International correspondence between school children would be encouraged. It would widen the mental horizon and deepen the sympathies. Travel would become more frequent, because it would have lost most of its terrors. Life would have new zest, and the cause of Peace would be placed on the firm foundation of the mutual goodwill of the peoples of the world.

W. M. PAGE.

President Wilson on Friendship.

From Address given in Manchester, 30th December 1918.

Friendship must have a machinery, because, if I cannot correspond with you, if I cannot learn your mind, if I cannot co-operate with you, I cannot be your friend, and if the world is to remain a body of friends it must have the means of friendship, the means of constant friendly intercourse, the means of constant watchfulness over the common interest; not making it necessary to make a great effort to come with one another on some great occasion, but an easy and constant method of conference, so that troubles may be taken when they are little, and not allowed to grow until they are big. I never felt that I had a big difference with a man that I did not find, when I came into conference with him, that after all it was rather a little difference, and that if we were frank with one another, and did not too much stand upon that great enemy of mankind, which is called pride, we should come together. It is the wish to come together; that is more than half of the process; that is a doctrine which ought to be easy of comprehension in a great commercial centre like this. You cannot trade with men who suspect you. You cannot establish commercial and industrial relations with those who do not trust you. Goodwill is the forerunner of trade. Goodwill is the foundation of trade, and trade is the great amicable instrument of the world.

Amikeco devos posedi maŝinaron, ĉar se mi ne povas korespondi kun vi, se mi ne povas lerni vian penson, se mi ne povas kooperi kun vi, mi ne povas esti via amiko, kaj se la mondo restados aro da amikoj ĝi devos posedi la rimedon por amikeco, la rimedon por konstanta amika interrilato, la rimedon por konstanta viglado pri la komuna intereso, por ke ne estu necese fari grandan penon por kunveniĝi ĉe iu granda okazo, sed feliĉan kaj konstantan metodon de konferenco, por ke malkonsentoj povu esti pritraktataj, kiam ili estas malgrandaj kaj malpermesataj kreski ĝis ili fariĝu grandaj. Mi neniam sentis, ke mi havas grandan malkonsenton kun viro, ke mi ne trovis, post kiam mi pridiskutis kun li, ke post ĉio ĝi estis iom malgranda malkonsento, kaj ke se ni estus sinceraj (malkaŝemaj) unu kun la alia, kaj ne tro fidis al tiu granda malamiko de la homaro, la Fiero, ni povus kunveniĝi. La volo kunveniĝi, estas pli ol duono de la procedo, tiu estas doktrino, kiu devas esti facile komprenebla en granda komerca centro kiel ĉi tiu (Manchester). Vi ne povas negoci kun homoj, kiuj suspektas vin. Vi ne povas starigi komercajn kaj industriajn rilatojn kun tiuj, kiuj ne fidus vin. Bonvolo estas la antaŭiranto de komerco. Bonvolo estas la fundamento de komerco, kaj komerco estas la granda amikema instrumento de la mondo.

If a universal language could be adopted, and taught in every school throughout the world, it would, without a doubt, be a mighty factor in the keeping of future peace. No man can ever get on terms of real friendship with a man who talks gibberish, which is what we are apt to consider—as it really is to us—every unknown tongue. I would like to see a common language made one of the principles of the League of Nations.

JOHN OXENHAM.

Ekzercoj de Aplikado de l'Oficiala Radikaro.

By H. M. SCOTT (U.S.A.).

BENZIN-

La aŭtomobila interkomunikiĝo estas kiel kutime, la diritan mankon de *benzino* mi ne rimarkis. *I.B.* i. 116.

BER-

Ni manĝas . . . fruktojn kaj *berojn*. *F.K.* 116.

Ŝtono de l' grandeco de *vina bero*. *Far.* ii. 17.

Ĝi devas elekti . . . bongustan *vinberon*. *F.K.* 190.

Kun prunoj aŭ kun *sekvinberoj*? *U.L.* 122.

Tuj aperis sur (la trunko) *beraroj* kun maturaj *beroj*. *Gen.* xl. 10. (Kp. *penikoj*. *Nom.* xiii. 23.)

BEST-

Leono estas *besto*. *Ekz.* 5.

Kio propre levis la homaron . . . super ĉiuj aliaj *bestoj*? *F.K.* 277.

Via Rego venas al vi . . . rajdanta sur . . . azenido filo de *ŝarĝobesto*. *Mat.* xxi. 5.

La bovino . . . povas taŭgi nur kiel *tirbesto*. *E.F.* 14.

Fali kiel ofero de blinda *besta* forto? *F.K.* 107.

Ŝi estis edzino de *bestedukanto*. *E.F.* 2.

En unu el la Amerikaj *bestejoj*, k.t.p. (senco de *menaĝerio*). *F.K.* 200.

Oficiroj-rajditoj . . . venas ĉasi en la reĝaj *bestejoj*. *In. Kr.* 30.

BET-

Kulturado de industriaj vegetaloj (*sukerbeto*, k.t.p.) *Jar.* 6/234.

BETUL-

Mordetas la arbaraj skaraboj niajn *betulojn*. *F.K.* 196.

Bela *betula* arbareto. *Mar.* iii. 101.

BEZON-

Mi *bezonos* monon. *Ekz.* 14.

Ni *bezonas* uzi prepozicion. *Ib.* 29.

Mi . . . vidis negron tiel nigran, ke oni *bezonis*, por lin rigardi, ekbruligi kandelon. *F.K.* 88.

Li ne *bezonis* longe serĉi, la unukornulo tuj aperis. *E.F.* 122.

Diru mallonge, sinjoro pastro! kion vi tie ĉi *bezonas*? *Rab.* 68. (Kp. *Rev.* 72/3.)

Ni povos sendi al ŝi, se ŝi *bezonos*. *F.M.* 69.

Estimata sinjorino kredeble havas *bezanon* al la informa oficejo? *Mar.* iii. 150.

La lumo aperas kiel necesa *bezona* ataŝo. *F.K.* 270.

Ĉu lingvo internacia estas *bezona*? *Ib.* 274.

BIBLI-

Laŭ la rakonto de la *biblio* la religiaj kondukantoj vivis malriĉe kaj simple. *F.K.* 78.

Ni . . . posedu bonan tradukon de la tuta *Biblio*. *Ant. al Bib.*

BIBLIOTEK-

Ĉiu el la regimento . . . posedas propran *bibliotekon*. *F.K.* 88.

La *bibliotekisto* ne povis doni la naŭan volumon. *Ib.* 88.

BICIKL-

Por *biciklo* la vojo estas tro *sabla*. *U.L.* 145.

Li sursaltis sian *bicikleton*. *Nel. ch.* i.

Biciklisto rajdanta sur biciklo. *Bou.* S.G. i. 43.

(Por difino de *biciklo* v. *K.* kaj *V.*)

BIEN-

Marta naskiĝis en nobela *bieno*. *Mar.* iii. 101.

Kiam li fondis *bienon* en Kalifornio, pereigis ĝin la sekeco. *P.A.* 77.

Si certe venis de la kamparo, por vidi ĉi tie la modelan *bienon*.

H. L.R. vi. 474.

En S. Peterburgo estis iu *bienhavanto* kun sia servutulo. *F.K.* 74.

Mi renkontis hodiaŭ la *bienfarmanton* de Sinjorino Krzycka. *B.S.* 45.

BEK-

En la *beko* de la ŝipo estis metita malgranda ligna kruco. *F.M.* 76.

La birdoj estis *bekintaj*. *B.V.* 15.

(La mevoj) komencis malforte *beki* lin. *P.A.* 87.

Tiun, kiu ne scios lerte flugi, la generalo *mortbekos*. *U.L.* 80.

Se birdo tro *bekas*, la katon ĝi vekas. *P.E.* No. 46.

BEL-

Rakontu *belan* historion. *Ekz.* 10.

Bela frosta vetero. *Ekz.* 34.

Ha, kiel *bele*! *Ekz.* 26.

Mia *belo* estis brava juna dano. *Ham.* 123.

Vi vidis inter la kaptitoj virinon *belaspektan*. *Read* xxi. 11.

La viro estis tre *belfigura*. *Mar.* iv. 12.

Paŝtas sin aroj da *bellanaj* ŝafoj. *Ekz.* 34.

Tio ne estas *belvida*. *Hom.* 74.

Pentri la fizikan kaj moralan *malbelon*. *Vort.* p. 109.

Malriĉulon ne *plibeligu* en lia juĝa afero. *El.* xxiii. 3.

Kia *superbela* eldono! *Bou.* *L.R.* vi. 193.

BELADON-

Beladono (estas) venena vegetaĵo, uzata en la medicino. *Vort.*

BELETRISTIK-

Verki aŭ traduki ion *beletristikan*. *Bou.* *L.R.* vi. 191.

La *beletristikaĵoj* restas sur la bretoj. *Ibid.*

* * *

The first edition (3000) of Mr Butler's compilation of Hymns in Esperanto is now exhausted, and a new edition is in preparation. Those who are willing to help by sending in further hymn translations, or by criticism of those already published, are requested to write to Mr M. C. BUTLER, c/o B.E.A.

Kaptito.

Ĉu viajn flugilojn vi ne lacigas, grileto?

Ĉiam, ĉiam kantante!

Mi estas pli timema ol vi, grileto; ĉar mi timas pri la ebla fino de via knara kantado, kaj vi ne timas pri la perfrotada eluzo de viaj nervaj flugiloj.

Vin vidante kantantan en via kaĝo, mi memoras pri miniatura birdo, tre, tre malgranda.

Kiam vi grincigas la dorsan muzikilon, kion pensos via grila cerbeto?

Ĉu ĝi ŝatos muzikon? Ĉu ĝi sentos ion el la ŭnutoneco de la kantado? Ĉu ĝi intencos flegi per la unutona krikrio sian mastron eble ĉagrenitan?

Ve, ja, via kanteto ne ĝojigas vin!

Vi rajte preferus la malsklavecon en hejmtroo malproksima, lokita en ampleksa tre malproksima kamparo, ĉu ne vere?

Via mastro vin liveras manĝaĵon; sed kion valoras laktuka folietaĉo?

Vi, grileto, vi estas tro danka al via mastro. Tiu fimanĝaĵo valoras nenion. Ĉiam el la salato superabundis iu laktuka peceto!

Kaj vi rimarku, grileto; la plej aĉa estas por la tagmanĝeto de la dorsmuzika ĉirpanto.

Ho, certe, certe, vi ricevas de li malpli, ol vi lin donacas!

Sed eĉ en la supozo, ke li vin manĝigus frandaĵon, ĉu ĉi tiu ne estas maldolĉa manĝata en malliberejo?

Kantu, kantu, grileto!

Kvankam malgaja, la kantado estas la nura efika distreco de kaptito!

Vi ne kantas al via mastro, sed al vi mem vi kantas, grileto!

SALDANHA CARREIRA,
(Lisbon).

Noto pri la vorto "iufoje."

de GEORGE GORDON, F.B.E.A.

De tempo al tempo oni vidas la vorton "iufoje" ne bone uzata en la senco de la angla vorto "once" aŭ "on a certain occasion" (unu fojon aŭ unufoje), kaj eĉ en la bonega Esperanto-English Vortaro de Sinjoro Millidge sub "fojo" kaj "iu" tiu eraro aperas, supozeble pro plum-aŭ preseraro, ĉar la signifoj alskribitaj al "iufoje" en tiu vortaro efektive apartenas al "unu fojon" kaj "unufoje."

"Iufoje" signifas "sometimes" (t.e. en nepreciza nombro, eble granda, eble malgranda, eble negranda, da fojoj, sed pli ol unu). Jen estas la pruvo el la verkoj de Dro. Zamenhof:

Iufoje mi havas dekon da gastoj, kaj ilia regalado kostas al mi ne pli ol du dolarojn. (Fund. Krest., 114/14.)

Iufoje la nubo restadis kelke da tagoj super la tabernaklo. (Nombroj ix. 20.)

Iufoje vojo ŝajnas ĝusta al homo, sed ĝia fino kondukas al morto. (Sentencoj de Salomono xvi. 25.)

Iufoje ankaŭ ili aliradis scivole al la granda krado. (Rabeno de Baĥarah en *La Revuo*, Vol. viii. 386/4.)

En miaj tradukoj de la klasikaj verkoj vi trovos iufoje lokon, kiu en la unua momento ŝajnos al vi ne tute klara. (Lingvaj Respondoj, No. 25.)

Iufoje en la kapo de tiu aŭ alia samideano aperas la sekvanta demando. (Parolo de Dro. Zamenhof ĉe la sesa kongreso.)

Iufoje tiuj okuloj estis petolemaj, pli ofte insultemaj kaj malicaj. (Marta, 125/26.)

Tie estis kapoj belege kovritaj de abundaj harligoj, inter kiuj iufoje per roza aŭ blua koloro brilis ia rubandeto . . . iufoje laĉo da koloraj koraletoj ĉirkaŭis la kolon. (Marta, 125/32.)

Okazas iufoje, ke mi restas en la magazeno pli longe ol ordinare. (Marta, 117/18.)

Iufoje ŝiaj brovoj kunŝoviĝadis, la esprimo de profunda pripenso aperadis sur la frunto. (Marta, 79/30.)

Fraŭlino Bonislavo estas iom kaprica kaj iufoje faras grimacojn, sed se oni estas malriĉa, oni ja devas iufoje ion toleri. (Marta, 112/32.)

En la regiono de la arto, same kiel en ĉiu alia regiono, . . . la homo povas akiri sufiĉe bonajn, iufoje eĉ bonegajn kondiĉojn por sia ekzistado. (Marta, 84/13.)

Mi ne havas ekzemplon de la uzo de la vorto "iufoje" en senco alia, ol la senco en la supraj ekzemploj, de Dro. Zamenhof. Certe li neniam ĝin uzis en la senco de "unu fojon" aŭ "unufoje."

Ne malofte oni vidas "iafoje" uzata tiam, kiam la pli ĝusta vorto estas "iufoje." La kaŭzon de tio Dro. Zamenhof klarigas en Lingvaj Respondoj, No. 29.

"Unufoje" estas samsignifa kun "unu fojon."

Multe da fojoj aŭ multfoje—en nepreciza granda nombro da fojoj.

Malmulte da fojoj aŭ malmultfoje—en nepreciza malgranda nombro da fojoj.

Iufoje—en nepreciza nombro (eble granda, eble negranda, eble malgranda) da fojoj, sed pli ol unu.

Kelkfoje—ennepreciza negranda nombro da fojoj, sed pli ol unu.

Iafoje—en nepreciza nombro (eble granda, eble negranda, eble malgranda) specoj da fojoj aŭ okazoj, sed pli ol unu.

[“Ŝajnas, ke Sro. Gordon estas prava pri la signito de ‘iufoje,’ sed mi ne konsentas, ke ‘unufoja’ kaj ‘unufojon’ estas samsignifaj.”—E. A. MILLIDGE.]

* * *

Knabo, revenante hejmen el la lernejo, renkontis flegistinon, kiu diris al li,—He, Tomĉjo, ĉu vi ĵus venis el la lernejo? Dum vi estis en la klaso, nova frateto alvenis al vi.

—Ĉu jes? Kiu alportis lin?—respondis Tomĉjo.

—La kuracisto,—diris la flegistino.

—Nu, do,—diris Tomĉjo,—okazos granda malpaco, kiam la patro revenos kaj sciigos, ke vi ne ricevis lin de la Kooperera Magazeno!

B.E.A. Literatura kaj Debata Societo.



La unua jara raporto de ĉi tiu Societo, dissendota alla membroj, enhavas interesajn detalojn pri la ĝisnuna agado. La sekvantaj eltiraĵoj sendube interesos legantojn de la *Esperanto Monthly*.

La unua kunveno de membroj okazis dum Novembro 1917, kaj la kvanto da laboro farita post tiu tempo, kun kontentiga sukceso, klare montras la utilecon de la Societo. Ĝisdate pli ol 165 Esperantistoj aniĝis, kaj novaj aniĝoj estas raportataj ĉe ĉiu kunveno de la Komitato. Krom la profito gajnita per eldonaĵoj, multaj donacoj estas ricevitaj, kaj je la fino de 1918 la kaso montris solventecon (en kontanto kaj libroprovizoj) de preskaŭ 300 Sm.

Literatura Enketo. Unu el la unuaj faroj estis la starigo de enketo por eltrovi la opiniojn kaj dezirojn de britaj Esperantistoj rilate al estontaj verkoj. Al la demandaro dissendita 66 personoj respondis, kaj oni intencas eldoni resumon de la respondaro. La Komitato celas sekvi laŭeble la vojon montritan per tiuj respondoj.

Gazeto. Dum la jaro la Komitato eldonis tri kajerojn de manuskripta gazeto, *Literaturo*, invitante kritikojn pri diversaj punktoj traktitaj. Tiuj kritikoj multe utilis, kaj utilos, en la laboro de la Societo. Pro la kreskanta nombro de membroj, estas nun decidite eldoni la gazeton kiel eble plej baldaŭ en presita formo, ĉiutrimonate.

Tradukaj Rondoj. Jam oni starigis kvar el tiuj rondoj, kiuj tradukas respektive la jenajn verkojn: *Water Babies* (Kingsley), *A Tale of Two Cities* (Dickens), *Cranford* (Mrs Gaskell), kaj *Sesame and Lilies* (Ruskin). Ĉiu rondo konsistas el aro da spertaj Esperantistoj, kiuj laboras sub gvidado de estro elektita de la Komitato.

Manuskriptoj. Multaj samideanoj sendis al la Komitato manuskriptojn por

korektado aŭ kritikado. Kelkajn el ili oni kritikis en kunvenoj de la membroj; aliajn oni transdonis al individuaj membroj por plenumo de la laboro.

Eldonaĵoj. Krom la gazeto *Literaturo* supre aludita, la Societo eldonis, ĝis nun, *La Granda Vizaĝo el Ŝtono* (Nathaniel Hawthorne), tradukitan de E. E. Yelland; *A Week at Esperanto*, trafa broŝuro por komencantoj, de S. Jackson Coleman; kaj belan fotografadon de la Majstro, de kiu multaj ekzempleroj jam vendiĝis. La Komitato celas la eldonadon de novaj verkoj de tempo al tempo, precipe bonaj tradukoj de anglaj klasikaĵoj.

Kunvenoj. Regulaj kunvenoj de membroj okazis en Londono, ĉe kiuj multaj interesaj temoj estas diskutitaj nur en la Esperanta lingvo, la sola permesata. Speciala kunveno por interesatoj okazis dum la Pentekosta Festo aranĝita ĉirkaŭ la B.E.A. Ĉiujara Kunveno. Krom la regulaj kunvenoj, la Societo respondis pri diversaj programoj por kunvenoj de la Londona Esperanta Klubo, kaj organizis tre sukcesan Literaturan Feston ĉe Morley College en Londono. Tiajn entreprenojn oni daŭrigos.

Konkurso. La Komitato bone komencis laboron por 1919 per la starigo de konkurso por lernantoj (detale anoncita en la lasta numero de *Esperanto Monthly*).

Post nelonge aperos la unua kajero de la presota gazeto *Literaturo*. Por ebligi fruan elsendon oni nepre abonu tuj. (La abono estas 2s. 6d. jare).

La Komitato de B.E.A. L. and D.S. volonte akceptos donacojn por antaŭenigi ĝiajn laborojn. Proponojn pri laboro farinda ĝi ĉiam konsideros.

Eldonaĵoj de B.E.A. L. and D.S. (Haveblaj ĉe B.E.A.)

1. Fotografado de Zamenhof: 9" x 7" sur karto 16" x 13". Prezo 2s. 10p. afrankite.

2* "A Week at Esperanto." Bonega propagandilo. 2½p. afrankite.

3* "La Granda Vizaĝo el Ŝtono," de N. Hawthorne, tradukis E. E. Yelland. 8½p. afrankite.

5. Broĉpinglo kun insigno de B.E.A. L. and D.S. 8p. afrankite.

* Oni donas rabaton de 2p. en ĉiu ŝilingo al grupoj.

Pri ĉiuj aferoj skribu al la Hon. Sek.—

S-ro C. H. EDMONDS, 254 WIGHTMAN ROAD, HORNSEY, LONDON, N.8.

La Terparcel'.

Kiel malĝojas mi
 Sen terparcel' !
 Kial sopiris ni ?
 Je terparcel'.
 Nun, en somervesper',
 Estas ĉiel' sur ter'.
 Ho ! estas bonafer',
 La terparcel' !

Goje foriras ni
 Al terparcel' ;
 Satinda estas ĝi,
 La terparcel' ;
 Sed, en vespera hor',
 Kial la brakdolor' ?
 Pro troa taglabor'
 En terparcel'.

Estas en ĉiu tag'
 Ĉe terparcel',
 Rikolt', sen ia pag'
 El terparcel' ;
 Kial de nia kor'
 Foriras la dolor' ?
 Pro la trealtvalor'
 De l' terparcel'.

Reĝas la vintro nun
 En terparcel' ;
 Ne brilas plu la sun'
 Ĉe terparcel'.
 Sed, en venonta hor',
 Rekreskos plant' kaj flor',
 Kun frukt' kaj bonodor'.
 En terparcel'.

J. P. CAW.

* * *

Estis fraŭlin' en Alsaco,
 Si multe ĝojegis pro l' paco ;
 Si estis kisata
 De viro soldata
 Kaj aŭdiĝis je mejloj la ŝmaco.
 CHARLES S. SCHLEICH.

* * *

Iu diris al Mark Twain, ke oni rekomendis al li, ke li manĝu fiŝaĵon, ĉar ĝi estas bona nutraĵo por la cerbo.
 — Do, mi supozas, diris la humoristo, ke estas necese por vi, ke vi komencu per manĝo de baleno.



New Competition for Boys and Girls.

Conducted by Miss JANE BAIRD.

This Competition is limited to boys and girls of not more than 15 years of age. Competitors must write their solutions on a postcard addressed "KONKURSO," c/o Miss JANE BAIRD, 95 Bellevue Road, Edinburgh, and add their age and the name of their school. A Monthly Prize will be given, and at the end of the Competition special prizes will be awarded to those whose names appear most frequently in the Honours List.

N.B.—It must be understood that Solutions are the competitors' unaided work.

In schools where Esperanto is taught it is suggested that the teacher collect the cards and send them in under an envelope, to save postage.

SECOND COMPETITION.

Postcards to be sent not later than 4th March.

(a) Bestoj.

Eltrovu la nomojn (nur radikojn) de bestoj kaŝitajn en la jenaj frazoj:—

1. En la ĝardeno troviĝas alta pirarbo.
2. Mia frato intencas revojaĝi al Kanado post la milito.
3. Bonvolu paroli kelkajn vortojn Esperante.
4. Eniru, mi petas, tre facile oni trovos sidlokon en la galerio.
5. Ne timu larĝe malfermi la fenestrojn. La freŝa aero estas tre saniga.

(b) Nomoj de Knaboj.

Eltrovu la nomojn (nur radikojn) de knaboj kaŝitajn en la jenaj frazoj:—

1. — Kiun vagonaro vi deziras trafi ? li petis.
2. Mi proponas iri la proksiman lundon al Dundee pro komercaj aferoj.
3. Dum la ludo, vi, kompreneble, devas zorgi ne diri "Jes" aŭ "Ne."
4. En via urbo estas tiom da vidindaĵoj, ke oni ne povas ne deziri resti longan tempon en ĝi.
5. La infano estas tute sen ia timo. Tertremado mem ne lin timigas.

Successful Children's Competition at Leeds.

One of the most interesting features of the proceedings at the Conference of the Yorkshire Federation, held at Leeds on 11th January, was the part allotted to the children.

The Children's Competition resulted as follows:—

Translation.—Clifford Wainwright (14), Leeds.

Translation (for children who have studied the language for less than one year)—Kathleen Brown (13), York.

Original Essay.—Clifford Wainwright, Leeds.

Song.—Edward Lunn (14), Huddersfield.

Recitation.—1. Sylvia Hartley (12), Leeds;
2. Annie Boocock (10), Northcote Girls' School, Armley.

Conversation.—Alfred Hirst (12), Huddersfield.

The Bolingbroke-Mudie Memorial Fund gave a prize to the winner of the highest number of points in the Competition, and this was awarded to Alfred Hirst, who spoke very fluently and correctly.

The most remarkable success was that of Kathleen Brown, who had studied the language without a teacher for less than three months.

The playlet, "Neĝblankulino," which appeared in our issue of December, was performed by children and enthusiastically applauded.

* * *

The Lancashire and Cheshire Federation is to hold its fourth Competition in Manchester on Saturday, 5th April. The programme contains seventeen items, several of which are for children. A copy will be supplied on application to the Secretary, Mr G. RHYS GRIFFITHS, 4 Holmleigh Cottages, Grassendale, Liverpool.

"THE WORLD SALESMAN." A *Monthly Commercial Review*, published in Yokohama, Japan. The first commercial journal to have drawn attention to the value of Esperanto as the common commercial language. It has regular articles on Esperanto, and publishes the names of firms using the international language. It will keep you posted on World-Trade. If you want to do business with the Far East or any other section, you should advertise in "The World Salesman." Subscription, 10s. per annum. Head office: 51, Yamashitacho, Yokohama, Japan.

* * *

KORESPONDANTOJN DEZIRAS

S-ro A. GALLON, Sanviken, Svedujo, por 110 infanoj en popollernejo.

S-ro J. H. FAZEL, Scouts' Commissioner, Topeka, Kansas, U.S.A., por skoltoj.

F-ino ROSALIE JENIČKOVA, Havličkova, 195, Velvary (ĉe Praha), Bohemslovakujo, por siaj lernantoj.

Pastro ALGOT TÖRNQUIST, Helmingby, Gävle, Sweden, por junaj lernantoj.

Policano W. ALCORN, 47 Courtenay Street, London, S.E.11, kun ĉiuj policanoj pri policunuigaj aferoj. Ĉiam respondos.

* * *

TENTH BRITISH ESPERANTO CONGRESS.

LIVERPOOL, June 6-10.

Tickets now ready, price 3s. 6d. till end of April. After that date 5s. Secretary: Mr J. D. Applebaum, 11 Mayville Road, Mossley Hill, Liverpool.

DUTTON'S ²⁴ HOUR

DUTTON'S Shorthand has only six rules and twenty-nine characters. Complete theory learned in twenty-four hours. That stage reached, practice quickly gives high reporting speeds. Send two stamps for specimen lesson to Dutton's College (Desk D. 62), Skegness.

SHORTHAND

THE ESPERANTO MONTHLY

Subscription—2/6 per annum, post free

SUBSCRIPTIONS and all BUSINESS COMMUNICATIONS should be addressed to *The British Esperanto Association*, 17 Hart Street, London, W.C.1

EDITORIAL MATTER should be sent to S-ro W. M. PAGE, 218 Bruntsfield Place, Edinburgh.

SELECT LIST OF ESPERANTO BOOKS

OBTAINABLE FROM
THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Incorporated)
 17 HART STREET, LONDON, W.C.1

IMPORTANT INTIMATION AS TO BOOK PRICES.

In accordance with the instruction of the Annual General Meeting of the Association on 20th May 1918, the Executive has made the following decisions:—

Members' Discount to be abolished.

The prices of books published abroad to be adjusted to meet the present great increase in cost of importation.

Members' Orders value 10s. or over post free. In all other cases at least 10 per cent. (one-tenth) should be added for postage.

Secretaries of Affiliated Groups and the Trade to receive the usual discounts and to pay carriage.

The present 10 per cent. War increase on list prices to be abolished.

THE ESPERANTO MANUAL

By MARGARET L. JONES

Fifth Edition. 1s. 6d. net, 1s. 8d. post free

THE ESPERANTO TEACHER

By HELEN FRYER

Sixth Edition. 1s. net, 1s. 2d. post free

Second Edition **THE** *Revised*

'EDINBURGH' ESPERANTO POCKET DICTIONARY

206 pages. 18,000 words

"A really useful, convenient, and presentable volume."—*British Esperantist.*

Leather, 2s. 7d. post free; Cloth, 1s. 7d. post free

SHAKESPEARE IN ESPERANTO

HAMLET (Dr ZAMENHOF). Paper, 2s.

MAKBETO (LAMBERT). Cloth, 2s.

LA VENTEGO (MOTTEAU). Cloth,
2s. 2d.

LA VENECIA KOMERCISTO
(WACKRILL). Paper, 1s. 6d.

THE BIBLE IN ESPERANTO

NEW TESTAMENT, complete

(Published by British & Foreign Bible Society)

*White Paper, Art Cloth, 2s.; French
Morocco, 2s. 6d.; Persian Yapp, 5s.*

*India Paper, French Morocco, 3s. 6d.;
Persian Yapp, 6s. 6d.; postage 3d. extra*

OLD TESTAMENT

Dr ZAMENHOF's Translations

Genesis, Exodus, Leviticus, Numbers,
Deuteronomy, 2s. each; the Psalms,
2s. 6d.; Proverbs, 1s. 6d.; Ecclesiastes, 9d.

By BERNARD LONG, B.A.

ESPERANTO AND WHY WE NEED IT

30 pp. Price 2d.

Two Shillings a dozen post free

"A convincing booklet"

INDISPENSABLE BOOKS FOR ADVANCED STUDENTS

GRAMMAR AND COMMENTARY

Compiled by

Maj.-Gen. GEORGE COX, B.A. (Cantab.)

Post free, 2s. 9d.

ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY

By EDWARD A. MILLIDGE

Post free, 5s. 3d.

ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY

By JOSEPH RHODES, F.J.I.

Post free, 5s. 5d.